

Ho Maria nazareta

(originale verkita en Esperanto)


M: TAUET, HIMMEL, DEN GERECHTEN



1. Ho Ma - ri - a na - za - re - ta,
2. I - un ta - gon vin vi - zi - tis



ho vi - rin' el Iz - ra - el!
Ga - bri - el, la Di - sen - dit'.



La bib - li - o mult - fa - ce - ta
Vi sen ed - zo gra - ve - di - ĝis,



pen - tras vin en — gra - co - bel'.
per la Sank - ta — Di - Spi - rit'.



Ĉi ra - kon - toj min in - vi - tu,
Vi - a je - so kaj o - be - o:



ke mi fun - de vin me - di - tu.
voj - mal - fer - mo el pe - re - o.



Ho Ma - ri - a, in - da in',
Ho Ma - ri - a, Di - Skla - vin',



mi kun ĝoj' me - mo - ru — vin.
ĉi - uj gen - toj be - nu — vin.



Ho Ma - ri - a, in - da — in',
Ho Ma - ri - a, Di - Skla - vin',



3. Lia horo ne jam venis,
sed Jesu' elaŭdis vin.
La servantoj akvon prenis,
kaj ĝi estis bona vin'.
Vino-plen' per faro Dia!
Tiom da! Por ar' ebria!
! : Kia Dia grac-abund'
el la kor-trabora vund'! : |
4. Via fil' surkruce mortis
por la sav' de l' mond', por mi.
Vi kun li turmentojn portis,
restis ĝis la fin' ĉe li.
Vi ne fuĝis de doloro,
malestimo, malhonoro.
! : Am' patrina tenis vin.
Mi admiras vin, Patrin'. : |
5. Kvankam volas kult' kaj pio
pli da glor', da klar' kaj hel',
gravas, kia la biblio
pentras vin en graco-bel':
aŭskultema, obeema,
kunsentema, eltenema.
! : Ho Maria, inda in',
mi kun ĝoj' memoru vin. : |

HO MARIA NAZARETA • M (Tautet, Himmel): laŭ Norbert Hauner, Lands-
hut 1777, nGL (SP) 764, tie Bb-majora • E (originale verkita): Albrecht Kro-
nenberger 2017-09-02

Komparu:

strofo 2: Luk 1,26-38; Mat 1,18; Luk 1,48

strofo 3: Joh 2,1-11; 19,31-37

strofo 4: Joh 19,25

*El la diversaj melodi-versioj mi elektis unu el la plej sen-
pretendaj: el mia diocezo Speyer, Palatinato, sud-okciden-
ta Germanujo. Sed tio memkompreneble ne estas deviga.*

Verku mem pliajn strofojn, ekzemple pri:

– la dekdu-jarulo en la templo, Luk 2,41-52

– la veraj patrino kaj fratoj de Jesuo, Luk 8,19-21

– la ĉeesto de Maria inter la apostoloj, Ago 1,13-14